Johann Wolfgang von Goethe,

# Mara trankvilo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Kalmo regas sur la maro
Kaj senmove kuŝas ĝi.
Zorge vidas la ŝipisto
Glatan facon ĉirkaŭ si.
De nenie blovas vento!
Mort-trankvilo en la rond'!
En enorma la silento
Ne moviĝas iu ond'.

*Traduko de la Germana poemo "Meeres Stille" de* Johann Wolfgang von Goethe *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1983-10.11.*

*MR-103-3 / Arg-267-538 (2004-09-08 15:26:09)*

Johann Wolfgang von Goethe,

# Martrankvilo

*tradukita de Richard Schulz*

Silentego en la akvo,
Sen ondado nun la mar',
Zorgoplenas la ŝipestro,
Malstreĉitas la velar'.[2]
Triste staras nun la masto.
Semoveco kun terur'!
En la giganteca vasto
Morta ŝajnas la natur'.

*Traduko de la Germana poemo "Meeres Stille" de* Johann Wolfgang von Goethe *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* Richard Schulz *(Rikardo Ŝulco, ∗1906-07-12 – †1997-09-26) en 1984.*

*Arg-267-539 (2013-02-26 15:13:25)*

*Tiu ĉi poem-traduko aperis presita en 1984 en la "Vestfaliaj Flugfolioj", kiun eldonis la konata Esperanto-poeto Rikardo Ŝulco (Richard Schulz), kiam li loĝis en la germana urbo Mindeno (Minden). La kvaran kaj kvinan liniojn de la poemo mi, Manfred Retzlaff, provis en 2004-09-08 plibonigi; ĉar Rikardo Ŝulco erare neglektis, ke post la vorto "vidas" oni devus uzi la akuzativan formon "velaron". Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz`.

[2]Rikardo Ŝulco skribis erare:
Zorgoplene la ŝipestro
Vidas pendi la velar'. (Mankas tie la akuzativo.)